La oraĵisto nun konjektis fari bonan negocon. Li frapis afable la ŝultrojn de la kamparano kaj invitis lin eniri sian loĝejon, kie oni povas pli senĝene priparoli la aferon.

Li kondukis la vilaĝanon en la apudan ĉambron kaj por meti lin en bonan humoron, li alportigis bonan lunĉon kaj igis lin manĝi.

La vilaĝano ne lasis sin peti kaj manĝis; li formanĝis ĉion, kion la edzino de la oraĵisto metis sur la tablon antaŭ li. Eĉ tutan ŝinkon, kiun la oraĵisto decidiĝis oferi al sia spekulacio, finmanĝis la nesatigeblulo. Fine la mastro demandis: „Nu, kio nun estas pri la oro?“ „Jes“, diris la kamparano, „mi nur deziras scii, kiom da mono vi donus al mi por peco da oro, granda kiel infankapo?“

„Ho, se la peco estas eĉ nur duone granda kiel infankapo, ĝi valoras nepre 1000 talerojn“, respondis la oraĵisto „Nu, bone,“ deklaris la vilaĝano, „mi nur volis scii tion. Se mi foje trovos tiel grandan bulon da oro, mi alportos ĝin.“ Tion dirinte li malrapide foriras.

(Daŭrigota.) Trad. Alb. Mair-Wien.

Ernestine Berger

membro de Unua E.-Unuiĝo-Wien kaj de aliaj samurbaj E.-asocioj, mortis neatendite la 28. de aprilo. Jen estingiĝis, kvazaŭ flameto per ekblovo de printempa zefiro, vivo de estaĵo modesta sed altvalora.

Samideanino, fidela al E. tute en la senco kaj laŭ la principoj de la Majstro, ŝi akiris dum sia longdaŭra restado en Wien multajn adeptojn por nia afero per konvinka, kvankam maltrudema propagando kaj bonmetoda, sukcesplena instruado.

La noblanima varmkora homino forlasis nur tro frue ĉi tiun mondon, por eniri la regionon de l' eterna paco.

Ripozu dolĉe, kara amikino, ni ne forgesos vin! F. Zwach.

Achtung!

Der gute Verlauf unserer österr. Tagung und Ausstellung berechtigt zu den schönsten Hoffnungen für unsere Bewegung!

Wir wollen unser Blatt, ohne Preiserhöhung im Umfange von 16 Seiten herausbringen!

Wir können dies nur tun, wenn jeder einzelne für die Zeitung wirbt. 250—300 neue Bezieher sind nötig.

Wir wollen neue Rubriken eröffnen: Frauen-, Jugend-, kath.-, Arbeiter-Bewegung, Sport usw.

Geben Sie uns Ihre Wünsche bekannt!

Wir sind gerne bereit dieselben zu erfüllen, wenn irgend möglich.

Teilen Sie uns gütigst die Adressen aller Ihnen bekannten Esperantisten mit.

Wir beantworten alle Anfragen umgehendst, wenn Rückporto beiliegt.

Senden Sie kleine Artikel ein! Arbeiten Sie mit! Vergessen Sie nicht, **zeitgerecht** Ihr Bezugsrecht zu erneuern! Für **jene,** bei denen **das Bezugsrecht mit dieser Nummer** abläuft, liegt Erlagschein bei!

AŬSTRIA ESPERANTO-DELEGITARO

Bisamberg bei Wien 248.

En tri kunsidoj, la 17. 6., 24. 6. kaj 1. 7. la estraro pridiskutis la diversajn laborkampojn, akceptis detalan laborprogramon por aŭtuno kaj starigis novan sekcion por arĥivo (gvid. s-ro Vasta).

Ni dediĉis nian tutan atenton al la ankoraŭ ne solvita deficitafero de la XVI. Pri ĉi tiu punkto ellaboritaj precizaj proponoj estis tuj sendataj al ICK. por decido en K. R. kunsido en Danzig.

La protokolo de la unua kunsido estis dissendata, tiuj de la aliaj post kelkaj tagoj sekvos.

Por AED.: Steiner, prez., Bernfeld, ĝen. sekr.

Großer Tagesausflug nach Preßburg.

„Die Frau von heute“, Wien, VIII., Alserstr. 23 (Tel. 21.161) veranstaltet am 11. September mit Separatdampfern einen großen Ausflug nach Preßburg. Sie ladet durch die Presse die Bevölkerung Wiens zu zahlreicher Teilnahme ein und bittet besonders Vereine um baldige Anmeldung.

In Preßburg Empfang durch die Behörden, Führung durch die Stadt, Festlichkeiten, Rückfahrt mit Bahn oder Schiff.

Am 12. September Gegenbesuch der Preßburger. Aufenthalt in Wien 4 Tage.

Der Leiter unseres Werbedienstes Mag.-Rechn.-Rat R. M. Frey hat für die „Frau von heute“ die Durchführung der Reisen übernommen.

Wir laden alle Esperantisten Wiens und der Umgebung ein, an dieser Fahrt nach Preßburg teilzunehmen, da dies eine

gute Propaganda für Esperanto wäre. Die Esperantisten Preßburgs sind an den Vorbereitungsarbeiten für die Reisen mittätig und werden zu gutem Gelingen beitragen.

Esperantovereine und Einzelpersonen mögen sich baldigst anmelden bei Herrn Frey, Wien, III., Bechardg. 14.

Für die AED: Steiner, prez., Bernfeld, ĝen. sekr.

Oesterreichs Werbegesellschaft für Esperanto.

(Aŭstria varb-societo por Esperanto. AVSE.)

Der gut gelungene Kongreß und der Erfolg der Ausstellung wird die Esperantistenschaft vor viele neue Aufgaben stellen, zu deren Durchführung vor allem Geld nötig ist.

Um dieses, hauptsächlich aus Nichtesperantistenkreisen, zu beschaffen, hat der Gefertigte „AVSE“ gegründet, deren Satzungen bei der Behörde bereits eingereicht sind.

AVSE soll keiner der bestehenden Esperanto-Einrichtungen Einbuße tun.

Beiträge für Förderer S 50.—, f. unterstützende Mitglieder S 10.— und f. außerordentliche S 1.— für das Jahr.

Alle Esperantisten werden gebeten, mit wenigstens 1 S. der Gesellschaft beizutreten und für alle 3 Gruppen von Mitgliedern, hauptsächlich bei Geschäftsleuten, zu werben. Für Einzahlung Erlagscheine von A. E. anfordern.

Bei Werbung von Geschäftsleuten darauf hinweisen, daß in eigener Rubrik von A. E. solche mit Beiträgen von 10 S. zweimal, solche mit 50 S. sechsmal im Laufe des Jahres eingeschaltet werden.

Samideanoj, die die Funktion eines Vertrauensmannes in ihrem Bezirke (Werbung, Inkasso usw.) übernehmen und damit für Esperanto mitarbeiten wollen, mögen dies mit Karte bekanntgeben. Es ist beabsichtigt in jedem größeren Orte wenigstens einen Vertrauensmann zu haben, der auch dann in den Beirat des Vereines Aufnahme findet.

Satzungen gehen denselben dann zu. Unterstützet mich.

Hugo Steiner
Präsident der AED., Herausgeber der A. E.

Die nächste Nummer erscheint anfangs September.

E.-Kurso per Radio por komencantoj okazas de l' 3. julio ĝis fino de sept. ĉiusemajnon, marde kaj ĵaŭde de 19·30—20h. Kursgvidanto s-ano Smital.

Graz: La fakultativa E.-kurso de prof. Hainschegg en realgimnazio Graz, Lichtenfelsgasse, bone progresis. Ĝin inspektis landa lernejinspektoro kort.- kons. d-ro Mörtl kaj la dir. de la koncerna lernejo d-ro Alb. Thalhammer. Ili esprimis sian surprizon pro la ega sukcesa, kiu rajtigas nin supozi, ke ĉi tiu provkurso estiĝu en la venonta jaro jam ne plu tia. La atestoj de la lernantoj enhavis noton pri E.-scio.

Wien. Bohema Klubo Esp.: Lumbildparolado okazis de s-ro Ĉech pri „Vojaĝo de Tunis al Biskara“. **E.-soc. „Danubio“** aranĝis en majo Lanner-Strauß-vesperon bonege vizitan. El la programo: Lumbildparolado de s-ro Vasta, muzikaj prezentadoj el la plej famaj komponaĵoj de ambaŭ muzikherooj (salonorkestro Rutschka) kaj ĉarmaj dancoj de f-ino Stanislawski kaj s-ro May laŭ Lanner-Straußmelodioj. La 20. junio lumbildparolado de f-ino Metzker pri Japanlando, enkondukaj vortoj de s-ano prof. d-ro Jokl. La 11. julio vizito de s-anino Matilde de Guerra el Tampiko (Meksikolando). **E.-grupo de „Naturfreunde“** kunvenas ĉiun 1. kaj 3. merkredon III., Radetzkystraße 23. Informu vin tie pri ĉiudimanĉaj ekskursoj.

Ĝardenfesto.

La juna, sed tre vigla grupo „Komercista Esp. Junulara Unuiĝo“ aranĝis la 2. julio grandan ĝardenfeston, kiu unuigis grandan nombron da samideanoj, inter ili el la AED.-estraro la s-rojn Bernfeld, Ĉech, Feder, Frey, Klein kaj direkt. Smital kun edzino kaj patro kaj prokuriston Schade.

S-ro Frey salutis anstataŭ la malhelpita prez. Steiner en la nomo de AED.

La programo estis bonega kaj restadigis la festgastojn ĝis noktmezo.

Gratulon al la fondinto kaj honorprez. dir. Stengel kaj al la komitatanoj gefraŭloj Maller, März, Moritz, Hannakamp kaj Vrana.

Rimarkindaj Presaĵoj.

El la eldonejoj:

Tagblatt-Bibliothek-Wien:

Jus aperis:

Esperanta Komerca Korespondo
de d-ro Emil Pfeffer.

Komercistaj modelleteroj pri la plej gravaj okazajoj de l' negoca vivo kun akompananta germana teksto kaj fakaj klarigoj. 92 paĝoj. Prezo 80 groŝoj (RM. —·50).

Postulu senpagan prospekton.

Ellersiek & Borel-Berlin:

Rapido, Esperanto-Stenografio laŭ la oficiala germana unueca sistemo, verkita de Karp Wallon, komuna eldono de H. Apitz kaj Ellersiek & Borel, Berlin 1927, 21/15 cm, 32 pg., Rm. 1.—.

Depost mallonge en Aŭstrio kaj Germanlando, kie estis instruataj diversaj sistemoj stenografiaj, oni oficiale enkondukis la unuecan sistemon, kiu similas al Gabelsberger-stenografio. Tiun unuecan sistemon W. aplikas por E., aldonante kompreneble signojn por la ĉapelitaj literoj. Sed bedaŭrinde li ankaŭ senbezone ŝanĝas multajn signojn de la oficiala sistemo kaj tiel malfaciligas la rapidan uzadon al tiuj, kiuj bone skribas en la nacia sistemo. En la antaŭparolo W. diras: „En tiu ĉi unua eldono mi prezentas nur la skeleton de mia transkribo, por ke ĝi estu praktike provata kaj akceptas eventualajn korektojn kaj proponojn.“ Esperanto-stenografistoj faru ilin!

Schamanek-Tullnerbach.

Hirt & Sohn-Leipzig:

Ivan S. Turgenev, Elektitaj noveloj, trad. Alexandra Mexin; Int. Mond-Lit., vol. 3a; 1923; 81 pĝ; prezo: S 2·70.

„Ne-ruso plej bone komencos la studadon de la rusa literaturo per ĉi tiu poeto, ĉar . . . li kvazaŭ sur oportuna vojo enkondukas en la fremdecan regnon de la rusa animo.“ Tiu ĉi trafa frazo en la saĝe kaj klare skribita antaŭparolo (kun biografio) motivas la elekton de l' aŭtoro, la unua ruso por „I. M.-L.“. Leginto bone komprenos, ke la anglo Carleyle la unuan novelon, „Mumu“, nomis la plej kortuŝan el ĉiuj rakontoj, kiujn li iam legis. Kiu mem vivis inter rusoj scias, ke ne malofte estas tie homoj, kia estas la ĉefa figuro Gerasim: diligenta fortegulo kun simpla amsopira puranimo, malŝateganta ebriulojn. Li komprenos facile, kiom suferis tiaj homoj sub la servuto. Tiu laborema senĝoja Gerasim devis lasi sian simplule adoratan amatinon al drinkulo kaj eĉ hundidon fidelan, al kiu poste lia kor' aliĝis, li devis mortigi — — pro kapricoj de sia posedantino. — La dua bildo, majstra vortpentraĵo de rusa nokto en la stepo, ĉe memspertinto kaŭzas nostalgion. Kulturhistorie interesa estas mistere enplektita babilado de kvin knaboj ĉe paŝtista fajro pri rusaj superstiĉoj. — El la „poemetoj en prozo“ parolas kortuŝa simpleco kaj animprofundeco samtempe: La delikata fingro de poeto forŝovas iomete la kurtenon de la naturo kaj igas rigardi vin lastajn problemojn de l' homa interno. — Ne preteriru tiun valoregan malmultekostan libroperlon, kies lerta E.-stilo krome pliriĉigos certe la vian!

W. Smital-Wien.

Rud. Mosse-Berlin:

Bratescu-Voinesti: Niĉjo Mensogulo kaj aliaj noveloj. Tradukis el la Rumana T. Morariu. N-ro 10.

Jen kelkaj ĉarmaj skizoj pentrantaj laŭnature ĉiutagajn farojn kaj agojn de rumanaj vilaĝanoj, bagatelaĵojn el la vivo de homoj sed ankaŭ de birdoj kaj aliaj bestoj kaj bestetoj — bagatelaĵoj: ekstere, sed pentritaj plastike kun psikologia subtileco.

Dum ni sekvas la simplajn okazintaĵojn ni pli kaj pli interesiĝas pri la internaj movoj, emoj kaj peloj, kiuj ondiĝas en la animoj de la agantoj. La verkisto ne faras analizajn paroladojn, psikologiajn rimarkojn, sed devigas nin rigardante la faktojn enpenetri spirite en la profundan animan vivon de infanoj kaj plenaĝaj homoj, devigas nin partopreni en la doloro de koturnino kun ŝiaj idetoj, kompati la najtingalon mortintan pro malatento de tiu, kiu ĵus kortuŝite aŭdis ĝian ravigan kanton. Li montras per trafa esprimmaniero kiel malĝuste kaj maljuste la homoj, speciale la infanoj, estas prijuĝataj; li do vekas komprenon, indulgon kaj kompaton, kio estas la celo de bona dramo same kiel de bona novelo.

Ĉar Bratescu estas en sia lando famkonata kaj altŝatata verkisto (premiita de la Akademio), ni esperantistoj devas danki al la tradukinto, kiu per sia bona kaj lerta traduko tiun perlon el sia nacia literaturo presentis al la tuta mondo. La libreto ne estas ĉiuparte tre facile legebla; sed tio ne estas pro malbona stilo sed pro la delikata enhavo kaj plejparte — tion sentas tuj la atente leganto ankaŭ la ne Rumana kaj ĝojas pri tio — pro la severa inklino al la nacia kaj vilaĝana esprimmaniero.

Do prenu kaj enpensu, sed ne „traflugu“!

Lud. Siedl.

Sennacieca Asocio Tutm.-Paris.

Karl Marx, lia vivo kaj verko; esp.-igis V. Elsudo. Nro. 5, 90 pĝ., poŝformato, Rm. —.60.

Libreto, kiu anstataŭas libregon. En ĝi oni trovas la plej fame konatajn revoluciulojn kaj spertulojn pri Marks-a idearo. Pri la titole citita temo okupiĝas: R. Lenin kaj F. Engels (vivo de K. Marks), ambaŭ ankaŭ enpenetras profunde en Marks-an sociologion; R. Luxenburg (La Marks-a kapitalo); fine prof. S. Semkovski profundscience resumas la demandon „Kio estas Marksismo?“ Li komparas Darvinismon kaj Marksismon kaj montras, kiel logike Marks kompletigis la teorion de Darvin.

Iomete kritikindaj nur estas kelkaj strangaj esprimoj — ekz.: subbaki farton —, kiujn oni nepre evitu.

M. Lehner-Graz.

Aliaj:

Esperanto-Mondo, int. monata revuo por Literaturo, Tekniko kaj Sciencoj. Admin.: L. Dederichs, Hannover, Sallstr. 124 (Germanlando).

Literatura Mondo mortis, naskiĝis Esp.-Mondo. La redakcio intencas per ĝi restarigi la iaman gazeton „La Revuo“. Bedaŭrinde nek la aspekto nek la enhavo de n-ro 1 atingas la nivelon de tiu eminenta revuo, en kiu ankaŭ nia kara majstro kunlaboris. Sed tio ja povas iom post iom pliboniĝi, se ĉi tiu nova gazeto sukcesos akiri sufiĉan nombron da interesuloj,

kiuj elspezos la certe ne altan abonprezon da 1 Dol. pojare. Ni deziras al la nova revuo bonan sukceson! D-ro Sós.

Korespondado:

S-ro Sigeo Honda, Temma-poŝtoficejo, Osaka, (Japanujo): Pl. P. aŭ L.

S-ro E Herrera Valenzuela, Str. Av. Errazuriz 1070, San Fernando (Ĉilo, Sudameriko): kor. IP.

S-ro Siswosoedirdjo, Tjepogo, Bojalali (Java, Nederlanda Indio): PI.

S-ro Vincente de la Vallina, studento, Str. Santa Domingoll, Oviedo (Hispanujo): PM, Pl.

S-ro N. Zilver, Box H. S. P. 1055, Damrak 95, Amsterdam (Nederlando): PM.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Radetzkystr. 6/III, Vereinsheim (kunvenejo) „Pastete", Sporgasse 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Innsbruck.

Arbeiter-Esp.-Klub (Laborista klubo), Südtiroler Platz, Hotel Sonne, Do (ĵ) 20—22 h.

Esperanto-Klub, Gasthof „Goldener Greif", bei der Triumphpforte, Mi (me) 20—22 h.

Wien.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, I., Freyung 6 (Pfarrkanzlei), Mi (me) 17—19 h.

I. Wiener Esp.-Verein, I., Schellinggasse 7, Schellinghof, Fr. (v) 19·30 h.

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, III., Henslergasse 3, Hochparterre; Do (ĵ), 19—21 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, Di (m) 17—19 h.

„Konkordo", V., Margaretenplatz 4 (Terrassencafé), Do (ĵ) 19—22 h.

Esp. laboristaro kristana de Aŭstrio, VI., Gumpendorferstraße 39, Do (ĵ); XII., Tivoligasse 38, Mo (l); XV., Beingasse 22, Mi (me); XVI., Rückertgasse 9, F (v) je la 19a.

Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—22 h.

Esp.-societo „Danubio", VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—23 h.

Esperanto Bücherstelle d. Freien Esp. Arbeitsgemeinschaft, VII., Lerchenfelderstr. 23; Auskünfte (informoj): Täglich 18—19·30 h.

Esp.-Bildungsverein „Supren", VII., Kaiserstraße 121, Café, Fr (v) 18—21 h.

Bohema Klubo Esperantista, XV., Turnerg. 9, I. et., Narodni dum, Mi (me) 20 h.

Esp.-societo „Fideleco", Währinger Bürgercafé, XVIII., Staudg. 1. Di (m) 16—19 h.

Esp.-soc. „Kulturo", XVIII., Kreuzgasse 34, Café Hildebrand, Do (ĵ) 19·30 h.

Rekomendindaj firmoj.

Graz.

Café = kafejo:
„Post", I. Haring, Neutorgasse.

Korneuburg.

Bäckerei = bakejo:
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.

Sie zahlen dann für 1934 fortlaufend monatlich 100 gr bezw. 155 gr und bezahlen damit schon im Vorhinein für 1935 ihren UEA-Beitrag und erhalten damit die Prämie, ohne je mehr nachzahlen zu müssen als 100 bzw. 155 gr monatlich.

Jene samideanoj, die den Beitrag für die Zeitung schon für einige Monate für 1934 mit ihrem Abonnement bezahlt haben, bekommen den betreffenden Betrag am Schlusse 1934 rückvergütet, bzw. zahlen dann die letzten Monate im Jahre 1934 weniger, event. nichts.

Die Gruppen werden gebeten, die Beiträge monatlich einzuheben und mit Erlagschein an die AEA zu bezahlen. Mitglieder, die nicht am Sitze einer Gruppe wohnen, zahlen in Briefmarken (event. für 3 Monate) an ihre Gruppe ein.

Sollte jemand durchaus nicht der Organisation beitreten wollen, so möge er weiter treuer Abonnent der Zeitung bleiben und wenigstens so zum Bestehen der Zeitung beitragen.

Eigentlich wäre eine Aenderung der Mitgliedsbeiträge ein Punkt der Generalversammlung! Aber wir können nicht bis Mai warten, weil zu wichtige Dinge für Esperanto auf dem Spiele stehen.

Ich bin überzeugt, dass der Grossteil der österreichischen Esperantisten mit mir voll übereinstimmt und mir auch durch seine schriftliche Zustimmung, dass er (ob er nun Mitglied einer Gruppe jetzt schon ist oder nicht!) ab Jänner 1934 „internationales" Mitglied sein will, die Möglichkeit gibt, weiter zu arbeiten!

Ich leite daher eine **Volksabstimmung** ein und bitte jeden, der mit meiner Leitung zufrieden ist und wünscht, dass ich meine Arbeiten fortsetze mich bis 10. Dezember mit beiliegender Karte zu verständigen unter Angabe in welcher Kategorie er eingereiht zu werden wünscht! (40, 70, 1.—, 1.55) und bei welchem Vereine er ist oder sein will. Die „internationale" Mitgliedskarte berechtigt zum Besuche aller österr. E.-Vereine.

Ich warte samideanoj auf Ihr Signal, ob ich weiterarbeiten soll. Steiner.

Eine grössere Zahl bekannter Esperantisten hat bereits schriftlich zugestimmt!

Die Leitung des Oesterr. Esperanto-Bundes schliesst sich obigem Aufrufe an.

Propagandvespero de Viena E.-Unio.

La 20. oktobro en IV. Magistrata domo (festsalonego) prez. dir. Kaftan salutis la samideanaron kaj gratulis nome de la Vienaj E.-Unio al reg. kons. Steiner pro la distingo per la „Ora Honorsigno" de ICK.

Programo: R. Cech „Nia grup-laboro", dir. Fr. Menacher „La taskoj de E.-instruado", O. Zimmermann „La taskoj de E.-varb-laboro", prez. Steiner „Sukcesoj de AEA", d-ro Mildwurf „Pri Danujo", d-ro E. Pfeffer „Novaj vojoj de praktika propagando".

Braunau am Inn: E-kurseto por soldatoj, gvid. Haselbauer, kiu multe klopodas ankaŭ pri gazetservo.

Krems: Depost 5. X. la grupo kunvenas denove ĉiun jaŭdon vespere en Real-lernejo. La 19. X. komenciĝis nova E.-kurso; gvid. f-ino Prokopp.

Fideleco-Wien — 25-jara.

La 24. okt. festis „Fideleco" en Wien sian 25-jaran jubileon. Vicprez. de AEA kalk. kons. Frey salutis nome de AEA kaj la malhelpita prez. reg. kons. Steiner, prof. Simon kiel kunfondinta membro kaj prez. Cech nome de Danubio. „Fidelico"-prez. kort. kons. d-ro Klečka faris rerigardon je la agado de la pasintaj 25 jaroj kaj kortuŝe memoris la antaŭ 1 jaro mortintan fondinton kaj prezidanton (ĝis lia morto!) Adolf Macho. S-ino Sieel humore prelegis siajn memorajojn, speciale pri la autaŭmilita vivo en „Danubio". Ad multos annos!

„Esperanto-Klubo en Wien" aranĝis la 9-an de Novembro tre bone vizititan lumbildparoladon de registara kons. Hugo Steiner pri „Danujo kaj Svedlando kaj Princlando Liechtenstein". La parolanto substrekis la praktikan valoron de Esperanto en la varbado por ĉies patrolando kaj menciis la diversajn varb-vojaĝojn por „Aŭstrio", de la oficialaj ŝtataj kaj aliaj instancoj ege subtenitajn, dum la lastaj jaroj Li akcentis en ĉeesto de la multaj oficialaj reprezentantoj (ĉi malsupre cititaj) la novajn sukcesplenajn laborojn de AEA (Aŭstria Esperanto-Asocio), i. a. la „Esperanto-servon por la eksterlando per Radio" ĉiumerkrede, kiu agado de semajno al semajno pli kaj pli estas ŝatata de niaj oficialaj instancoj (vidu en „Heraleo", antaŭa numero!). Ĉeestis por financ-ministro d-ro Buresch: D-ro Weisser, por instru-ministro d-ro Schuschnigg: Reg. kons. Schubert, por komerc-ministro Fritz Stockinger kaj por ŝtatsekretario Neustädter-Stürmer: Min. dir. Fuchs, por landestro Reither: Reg. kons. d-ro Hofmockl; plue reĝa Dana konsulo V. V. Broch (ankaŭ en la nomo de ĝeneralkonsulo Meinl), nome de la registaro de l' princlando Liechtenstein: Dir. Hartmann, Magnificenco prelato d-ro Tomek, la rektoro de la universitato Wien; kortega kons. d-ro Schumann (Teknika altlernejo), reg. kons. v. Josch (Akademio de belaj artoj), supera konsil. Langer (por la prez. de la federaciaj fervojoj generalo Vougoin); dir. d-ro Wilhelm (por la prez. de „Aŭstria Trafikoficejo" d-ro Strafella kaj por ĝen. dir. d-ro Steyrer); d-ro Ulrich por deputito kort. kons. Klieber; plue episkopo Tüchler generalo barono Odelga, sekcia ĉefo d-ro Uebelhör, landlernej-inspektoro kortega kons. d-ro Wollmann ktp. La federacia kanceliero d-ro Dollfuss, Vickanceliero Theresienritter Fey, iama-ministro Heinl, prez. de „Ravag" (Radio), petis pardonon pro foresto.

Wir bitten Ihren **Bezugsrückstand** für die Zeit bis .1933. per S. ...4.06 binnen acht Tagen einzusenden. Wir müssen den Drucker bezahlen. Nach den 3. Dezember gehen automatisch Postaufträge an die im Rückstand Befindlichen. Wir bitten, es uns nicht nachzutragen, wenn Ihnen dadurch Kosten erwachsen!

Anekdoto. En ekspozicion de modernaj pentristoj unutage venis Schwind. Li haltis antaŭ la bildo „Diluvo". „Grandioze, bonege!" Jen alkuris la verkisto de la bildo. „Koregan dankon, majstro! Kiel mi ĝojas pri via juĝo!" „Sciu," diris Schwind, „mi ĝojas pro tio, ĉar la tuta nekapabla homaro tie supre devas dronaĉi".

La breĉo. „Tiu ĉi viro postlasis dolorigan breĉon en mia vivo". — „Ĉu vi estis intimuloj?" — „Tute ne, li nur ĉe piedpilkludo elpuŝis miajn du antaŭajn dentojn."

Malflamigita. Mary Pickford reveturis kun sia edzo Douglas Fairbanks al Ameriko el Eŭropo. Kunvojaĝanta riĉega Yankee ŝin rigardis persiste per ardaj rigardoj. Alproksimiĝante New-York la milionulo eluzis momenton, dum kiu ŝi troviĝis sola, montris al la giganta urbego kaj diris: „Ĉi tie mi naskiĝis, sinjorina moŝto!" Mary Pickford lin rigardis kaj respondis „Kiel domaĝe!".

Rimarkindaj presaĵoj

Eld. Rapida Venko, Uppsala

Esperanto-Lehrgang für Selbst- und Gruppenstudium von Th. Kiesenitzky und Fritz Linden. I-a parto, 144 pĝ. Prezo ne montrita.

La verko estas klare skribita kaj bona enkondukilo por komencantoj, konsistanta el 25 ne tro longaj lecionoj. Post la 5. kaj 10. lecionoj kaj je la fino de la tuta verko la aŭtoro ripetas la ĝis nun lernitajn regulojn. Ĉiu sekvanta leciono enhavas ankaŭ „ŝlosilon" por malfermi la „trezorejon" de la antaŭaj taskoj. Diferenco inter la du „movadoj" — ĝenerala kaj laborista" — por la aŭtoro ne ekzistas, li dediĉas sian verkon al la tuta esperantistaro. Kelkaj regulojn estas sufiĉe malfrue instruataj, ekz. la uzo de la akuzativa-n (§ 34) kaj de la imperativo (§ 52). Rilate la unuopajn paragrafoj mi rimarkigu la jenon: § 22 por la derivado de adverboj ne ekskluzive servas la finaĵo -e; § 42 E-prepozicio tamen po is influi la sekvantan vorton (komp. en la mondon); Dua ripetado XX tem s nur pri la rekta objekto; § 90 pli bone: „La aglidoj levis la kapojn"; § 133 ĉiutage pli paliĝis (ne indikita preseraro); § 145 laboro ne komencas, sed komenciĝas (la sola gravega eraro de la lernolibro); anst. „premfero" mi p efe us la esp imon „gladilo"; § 165 „mi petas" kiel respondo al sinsenkulpiganto estas germanismo (pli bone „vi ne ofendis min" aŭ similaĵo). En la aldono „konversacioj" en la paragrafo rilatanta al leciono 12: ĉu estas eble ktp. Rilate la lastan paragrafon oni estas scivola kie aperis la cititaj „Gajaj horoj por esperantististoj". Fine mi volas precipe laŭdi la koncizecon de § 114 lasta alineo (tabelvortoj), sed akcenti, ke gramatiko ŝajnas al mi pli grava ol opinias laŭ enkond ka aserto la aŭtoro. Krome oni ne diru pli ol estas pruvebla (kiomoble R. estas pli facila ol nacia lingvo, neniu decidos; sufiĉas, ke ĝi estas multe pli facila).

Dro Biehler.

British E.-Association, London.

„The Tenth Book of Homer,s Odyssey", translated into Esperanto Hexameters by Giles Dixey.

Estis belega entrepreno traduki la du famajn episodojn de la Odiseo, rakontitajn en la deka epopeo: la aventurojn, kiujn la herooj travivis depost sia alveno ĉe Ajolo ĝis la adiaŭo ĉe Kirkeo, forsendante ilin Had(es)-on. Mi jam komence diru, ke la tasko entute bonege sukcesis — lingve kaj laŭritme. Gravaj eraroj en la tuta traduko, ampleksanta 574 versojn, nur malmultaj okazis. Mi notis jenajn: v. 36 ne „el" sed „de" Ajolo Odisjo ricevis sian donacon; v. 72 homo nur estas aŭ „kulp-inda" aŭ „kulpiginda"; v. 144 la Tagiĝo (Eoso) ne „perfektigas" sed „finas" tagon; 149 „fajrfumo leviĝi ŝajnas", sed ne „esperas"; 297 oni povas „edzinigi", sed ne „edziĝi" diinon; 440 „por li per tio fortranĉi la kapon" (anst. „por al li tiel fortranĉi . . ."). Interesaj estas jenaj tradukoj: 14 regali (greke: philein = ami, ame trakti); 47 for ĉiu enhavo kuregis (greke: ĉiuj ventoj forkuris); 73 mi konfesas devigon (moi themis esti = ekzistas por mi leĝo); 94 trankvilaĵo vitreca (leuke = blanka; travidebla vitro ne ekzistis en la antikvaj tempoj); 319 ŝi vokis kaj klare direktis (epos T'ephat' ek t'onomazen = diris kaj elparolis la vorton); 359 grade varmiĝis la akvo (bonega traduko de la greka imperfekto: ekaiéto); 398 la rikolto de l' drogo (greke: kiujn estigis la drogo); 539 kiom restadas (metra keleuthu = la mezurojn vojaĝajn). Kelkfoje vorto estas aldonata al la originala teksto; 5 la „lacaj" kunuloj; 548 la dolĉan „floreton" de dormo (mi nur konstatu, sed neniel mallaŭdu tion!). Pli da rajto havus mallaŭdeto pro piiigo de la t. n. spondeaj versoj (12, 354; la sola originala estas forigata). La stranga vortordo en la v. 184 oni stus eble povinta jenmaniere „ripari": Sidis ni dolĉan vinon kaj kvanton imensan viandan — konsumante.

D-ro fil. Biehler.

Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris.

„Komentoj al la komunista manifestacio", trad. el la angla kaj kompilis T. Veder. Formato 11×17 cm, 56 paĝoj; prezo fr. fr. 3.60.